**PILO-PRESS**
Internacia
Informservo

Instituto pri
Kibernetika
Pedagogio
72paĝa broŝuro
en germana kaj
Esperanto
prezo: 3,-- GM

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 10/1975 - 19 mar 1975
Aperas ĉiusemajne

## Komuniko de la Plenum-Komitato de SAT

Parizo (pp). Sandor Gaspar, ĝenerala sekretario de la Hungara Sindikata Konsilantaro deklaris en intervjuo al "Hungara Vivo", gazeto de la Hungara Esperanto-Asocio, ke la hungaraj sindikatoj subtenas la uzon de la internacia lingvo Esperanto. Li opinias, ke ĝi helpas por disvolvi la internaciajn rilatojn inter sindikatoj per sindikataj rimedoj. Li deklaris sin preta subteni la proponon, ke per internacia rekomendo la sindikatoj helpu la disvastiĝon de Esperanto.

Leginte kaj zorge studinte tiun intervjuon, la P. K. de SAT

--trovas en ĝi perspektivojn kaj konkretajn proponojn, kiuj kongruas kun la programo de SAT, precipe kun la gvidrezolucioj de la 46a (en Toronto) kaj 47a (en Bergamo) kongresoj de SAT, kaj kies aktiva subteno sekve nature integriĝas en la normala, propra agado de SAT;

--esprimas sian gratulon por la iniciato;

--pretas kunlabori kun ĉiuj Esperanto-Asocioj kaj laboristaj organizoj (esperantistaj aŭ ne), en plena respekto de la respektivaj ekzistorajtoj, roloj kaj partikularecoj, por mobilizi ĉiujn disponeblajn fortojn por la sukceso kaj disvolviĝo de tiu agado;

--alvokas la membraron kaj la fratorganizojn (LEAoj, Frakcioj, Junulfako), ke ili alprenu celkonfirmajn iniciatojn, ĉiu laŭ sia propra rolo kaj karaktero, por subteni tiun agadon;

--aparte alvokas la sindikatanojn el ĉiuj tendencoj en SAT, ke ili turnu sin al la diversnivelaj instancoj de sia propra sindikato kun similaj iniciatoj por impulsi kiel eble plej vastan popolamasan subtenon, kaj informu la P.K. pri siaj klopodoj kaj ties rezultoj;

--sugestas, ke tiuj proponoj ricevu en la venonta kongreso de SAT en Hago la saman bonakcepton, kiun jam ricevis en Toronto kaj Bergamo la analoga alvoko de la Socialista Internacio.

******************

La adreso de SAT estas: SAT Sennacieca Asocio Tutmonda,
67, Avenue Gambetta, F-75020 Paris.

## 60a UK en Kopenhago

Rotterdam (pp). Laŭ la oficiala komuniko n-ro 5 de la Universalaj Kongresoj ĝis la fino de februaro aliĝis al la Universala Kongreso en Kopenhago 764 personoj el 42 landoj. Ĵus aperis ankaŭ la Dua Oficiala Bulteno de la 60a UK kun ĉiuj necesaj informoj kaj mendiloj. Ekde la 1a de aprilo validos novaj kongreskotizoj, estas do preferinde ka rekomendinde aliĝi al la kongreso antaŭ la 1a de aprilo.

## Bona rezulto ĉe la 13a Didacta

Nürnberg (pp) Kiel ni jam raportis, dum la 13a internacia foiro pri lerniloj kaj instruiloj funkciis ekspozicia stando de Esperanto-eldonejo Ludwig Pickel, Nürnberg. El la 50 000 foiraj vizitantoj ĉ. 8000 personoj supraĵe rigardis la Esperanto-standon kaj ĉ. 1000 personoj pli aŭ malpli serioze interesiĝis pri Esperanto, al kiuj interesuloj estis enmanigitaj informbroŝuroj. Pri la spertoj de tiu ekspozicio ni ankoraŭ detale raportos, sed jam nun ni povas konstati, ke la vizitantojn plej multe impresis la parolata lingvo. "Ĉu vi mem parolas Esperanton?", estis do la plej ofte farita demando.

## Planlingva eminentularo de Paderborn en Nürnberg

Nürnberg (pp) Okaze dela 13a Didacta kaj la 13a Simpozio de GPI (Asocio por programita instruado) restadis en Nürnberg la eminentaj planlingvuloj de Paderborn: Prof. d-ro Helmar Frank, D-rino Brigitte S. Meder, d-ro Hans Kasselmann, Guido Dignas kaj kompreneble Hermann Behrmann. Ili ĉeestis ankaŭ en la Esperanto-stando.

## Instituta broŝuro aperis

Paderborn/Nürnberg (pp) La Instituto pri Kibernetika Pedagogio (instituto de la Esplor- kaj Evolucentro pri objektivigitaj instru- kaj lernprocedoj, germana mallongigo FEoLL, Paderborn, FRG) nun prezentas sian novan 72-paĝan institutan broŝuron en dulingva formo, germane kaj Esperante. Ĉi-rilate la instituta direktoro, prof. d-ro Helmar Frank, eldiris: "Ke oni elektis planlingvon kaj ne unu el la tradiciaj resumlingvoj (angla, franca, rusa) kiel duan lingvon, ne unuavice montremas emancipitan eŭropanecon kaj ankaŭ ne volas atingi tutmonde pli grandan priatenton per nura okulfrapeco de la raporto, sed estas dezirindaĵo de kibernetika instituto atentanta pri la postuloj de ne-numerala donitaĵ-prilaborado. Pro la sama kaŭzo estis elektita kiel neŭtrala dua lingvo ne Interlingua (kiel kelkfoje en medicina literaturo), sed responde al la plej novaj decidoj de diversaj kibernetikaj laborgrupoj - la Internacia Lingvo Esperanto, kiu estas aparte favorema al donitaĵ-prilaborado. La resuma "Resumaj retrorigardo kaj prognozo" aperas krome ankoraŭ en la tri lingvoj plej disvastiĝintaj en la Eŭropa Komunaĵo post la germana, t.e. la angla, la itala kaj la franca."

La broŝuro raportas pri finiĝintaj kaj aktualaj esplor-projektoj, kiel fakterminaro, evoluo de aŭdvidaj periloj, uz-preparado de instru- kaj ekzamensistemoj. La ampleksa nomolisto de ĉiuj kunlaborintoj kaj la literaturo de la institutaj kunlaborintoj kaj nunaj kunlaborantoj staras en la fino de tiu interesa broŝuro.

Se montriĝos sufiĉe granda intereso, la Esplorcentro Paderborn klopodos esperantigi ankaŭ raportojn de la ceteraj FEoLL-institutoj. Estas do grave, ke eksterlandaj sciencistoj kaj institutoj anoncu sian interesiĝon.

La Instituto pri Kibernetika Pedagogio tutmonde serĉas interesulojn pri klerigteknologiaj demandoj por krei reton de sciencaj kontaktoj.

La broŝuro estas mendebla nur ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, D-85 Nürnberg, Postfach 2113, kiu havas la solan disdonrajton. La prezo de la broŝuro estas 3,-- GM. Libroservoj povas ricevi rabaton de 25 % ĉe mendo de minimume 3 ekzempleroj.

************

Pilo-Press - Internacia Informservo, aperas ĉiusemajne, jara abonkotizo 30 GM. Mendebla ĉe Ludwig Pickel, D-85 Nürnberg 1, Postfach 2113, PSchK Nürnberg 819 56-851

Pilo-Press prezentas:

## Hermann Behrmann

Hermann Behrmann, nask. 12.7.1935 en Zeven, instruisto, lernis Esperanton fine de aprilo 1962 aŭtodidakte. Li skribis diversajn lernolibrojn'ĉefe por gejunuloj; la plej sukcesa estas la instruverko "Esperanto programita" tradukita jam en 7 lingvojn. Li estas prezidanto de Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj, prezidanto de la nova Societo pri lingvolim-transpaŝa eŭropa interkomprenigo (Eŭropa Klubo) kaj estro de la laborgrupo "Interlingvistiko kaj Lingvokibernetiko".

Ek de la jaro 1969 li gvidis informcentron en Löhne/Vestfalio. multe prelegis en entute 10 eŭropaj landoj kaj disponas pri ampleksa kartaro de Esperanto-parolantoj.

Ek de la 1a de februaro 1975 li laboras kiel scienca oficisto en la Instituto pri Kibernetika Pedagogio (direktoro prof. d-ro Helmar Frank) en Paderborn; per tio li kvazaŭ fariĝis profesia esperantisto.

Nova adreso: Hermann Behrmann, D-479 Paderborn, Riemekestr. 62
Tel. 05251-32090 resp. 23641 (instituto).

*******************

Renkontiĝo kun prof. d-ro Ivo Lapenna

Kirkel/Saar (pp) Sarlanda Esperanto-Ligo invitas siajn membrojn kaj amikojn al renkontiĝo en la naturamika domo Kirkel/Saar, sabate, la 22an de marto 1975, 19 a horo. Post komuna vespermanĝo prof. d-ro Ivo Lapenna, Londono, eksprezidanto de UEA, prelegos pri la temo "Esperanto en perspektivo, ekesto kaj signifo de esperantologia ĉefverko".

Ekumena diservo kun Esperanto

Westerland/Sylt (pp/eh) En la ekumena diservo en Westerland/Sylt, FRG, okaze de la monda preĝotago de la virinoj parolis ses virinoj en ses diversaj lingvoj salutvortojn al la vizitintoj. Inter ili ankaŭ en Esperanto. La prezidanto de KELI, pastoro Adolf Burkhardt, sendis salutvorton, kiu estis parolita al la ĉeestintoj:

"KELI, Kristana Esperantista Ligo Internacia, kies membroj loĝas en 36 landoj kaj apartenas al tre diversaj eklezioj, salutas vin en tiu tago tre sincere. KELI intime konas la doloron de konfliktoj inter kristanoj kaj tial plenkore aliĝas al danko kaj peto pri ĉio kio unuigas. Nia komuna Sinjoro Jesuo Kristo estas centro kaj bazo de nia unueco."

Tiel la ĉeestintoj povis aŭdi la belan sonon de la internacia lingvo. Ankaŭ kelkaj partoj de la preĝoteksto estis parolita en Esperanto. Je la eliro la ĉ. 70 partoprenintoj ricevis la seplingvan informilon de KELI "Esperanto, la ekumena lingvo". La diservon partoprenis jenaj eklezioj: evangelika-luterana, roma-katolika, baptista, dana-evangelika kaj membroj de nekonata eklezio el USONO.

Esperanto en radio

Romo: La novaj ondoj de Radio Roma estas 30,90 m (9710 khc)
41,24 m (7275 khc) 50,08 m (5990 khc)

Varsovio: Dum la lasta tempo denove ekestis diskuto pri tio, ĉu enkonduki rubrikojn por komencantoj. Estas pledantoj por kaj kontraŭ. Pilo-Press opinias, ke ne povas esti la tasko de internaciaj radio-elsendoj eduki lingve komencantojn. Radio-stacioj devas prezenti perfektan, fluan, normalan lingvon!

## KONKURSO DE POLA RADIO

En la 1975 j. pasos la 30 datreveno de la finiĝo de la dua mondmilito. Okaze de la datreveno ni petas pri respondo al jena demando:

Kiaj pensoj venas al vi liĝe kun la proksimiĝanta 30 datreveno de la venko super faŝismo kaj finiĝo de la dua mondmilito?

Respondo al tiu ĉi demando rajtigas al partopreno en lotado de la ĉefaj premioj en la formo de 10-taga ekskurso tra Pollando kaj de multaj aliaj premioj kaj memordonacoj.

La leterojn ni petas sendi laŭ la adreso:

Polskie Radio, PL-00-950 Warszawa, Box 46, Pollando,

en kovertoj signitaj per la devizo "Konkurso", ĝis la 9 de majo 1975 j. - decidas la dato de la poŝta stampo -.

La rezultojn de la lotado ni anoncas en la disaŭdigoj de la Pola Radio la 15 de junio 1975 j.

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo fiksota de la Pola Radio.

POLSKIE RADIO
Warszawa